

# ESPERANTA FINNLANDO

1961

N:o 3

## INFORMILO DE FINNLANDAJ ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ

**JARKOLEKTO 1961 — 9 numeroj**  
Abonprezo enlanda 350 mk  
eksterlanda 450 mk  
aŭ 12 respondkuponoj

Bonvolu prefere aboni per la ĝirokonto  
8392 aŭ senpere en la poŝto.

Adreso de la administrejo (abonoj kaj  
anoncoj): Männikkötie 5 M 67,  
MAUNULA

Redakcio: Vilho Setälä, Kaarlo Jokinen, Emil Stenholm, Simo Raumavirta.

Redaktejo: Esperantotie 4, MATINKYLÄ (artikoloj, novaĵoj, recenzoj, intersanĝo de gazetoj)

Ĉiuj esperanto-organizaĵoj, kluboj kaj societoj estas varme petataj konstante kontribui per novaĵoj kaj interesaj artikoloj, proponoj ktp., por ke nia gazeto estu vera komuna informilo.

## TANSKAN SISÄMINISTERI ESPERANTOSTA

Kuluneen syyskuun 30 pnä piti Tanskan sisäministeri Søren Olesen radioesitelmän aiheesta »Esperanto kansainvälisen kielen pulman ratkaisuna», lausuen mm:

Olen vakuutunut siitä, että suunnitelmakieli aikanaan saavuttaa yleisen leviämisen ja tulee hyväksytyksi kansojen yhteiskieleksi. Historialliselta kannalta uskon toiselta puolen, että mikään edistys ei toteudu ennenkuin aika on kypsytynyt sitä vastaanottamaan. Mutta tämä on nyt tapahtunut kansainvälisen kielen pulman kohdalta. Kaikkiin maihin ulottuvat kosketukset ja yhteistyö niiden kesken tekevät juuri tänä päivänä välttämättömäksi maailmankielen, jota kykenevät käyttämään, ei ainoastaan oppineet, vaan kaikki ihmiset, ei ainoastaan tieteessä ja tekniikassa, vaan myöskin jokapäiväisessä elämässä.

Ennen oli olemassa Euroopan kieli, latina, mutta se on liian vaikea täyttääkseen nykyajan vaatimukset. Se on kuitenkin siroitellettu osan sanastoon kaikkiin Euroopan kieliin, ja sen ohella romaaniset kielet ovat sen

suoranaisia jälkeläisiä. Mikä on silloin luonnollisempaa, kuin että yhteiskieli kerää itselleen koko tämän yhteisen kulttuurisaarten. Näin juuri Esperanto on tehnyt. Se on helposti äännettävää ja kaunissointuista, ja sen kielioppi on yksinkertainen, selvä ja poikkeukseton.

On totta, ettei esperantoa vielä voi puhua missä tahansa kadulla ja myymälöissä. Mutta esperantojärjestöllä on laaja »konsuliverkko» yli maapallon, ja tähän kuuluvat osoitteet löytää vuosikirjasta. Sen avulla voi järjestää ulkomaanmatkan moniin maihin ja tavata siellä avuliaita oppaita, vieläpä päästä tutustumaan heidän koteihinsa ja siten saada todellista iloa ja hyötyä matkastaan.

Esperantoksi ilmestyy monenlaisia aikakauslehtiä, sitä käytetään säännöllisesti parinkymmenen maan radiolähetyksissä, ja jotkut päivälehdet ovat julkaisseet esperanton oppikursseja.

Esperantoseuroilla on usein ulkomaalaisia vieraita, jotka pitävät kiintoisia esitelmiä tai esittävät taiteellista ohjelmaa. Viime vuonna kierteli täten

Eurooppaa japanilainen sanomalehtinainen, puolalainen rehtori, saksalainen näyttelijä, ranskalainen ja englantilainen opettajatar sekä Amsterdamin yliopiston esperanton lehtori. Tänä vuonna saapuu esitelmöitsijä Uudesta Seelannista.

Käytännöllinen yhteiskieli on ajan vaatima. Nuorison on elämäntehtävänsä varten opittava niin paljon asiaa, että sillä ei ole aikaa oppia useita kieliä.

Niinpä esperanto tulee pian voittamaan. Emme tosin voi toivoa, että koko nykyinen täysikasvuinen kansa oppisi tämän kielen, vaikka kansalaisopistoissa se voitaisiinkin toteuttaa. Mutta tärkeintä on, että esperantokerhoissa käytetään esperantoa ja siten osoitetaan, että se on käytökelpoinen ja helposti opittava kieli. Näiden opintovuosi on juuri alullaan. Siksipä kehoitan varsinkin nuorisoa, mutta myös täysikasvuisia: oppikaa tänään esperanto, huomenna tarvitsette sitä.

Maailman Esperantoliitto on hyväksytty neuvottelusuhteisiin UNESCON

kanssa maailmankieltä koskevilla asioilla. Tämä maailmankieli on välttämätön. Pidetään paljon kansainvälisiä kongresseja, mutta on hävettävää — ja surullista — että osanottajat istuvat kuulotorvet korvissaan, jotta eivät kuulisi puhujaa, vaan muutamalle suurkielelle tehtyjä käännöksiä, joita monet heistä ymmärtävät vain puutteellisesti. Eräässä tällaisessa kongressissa, joka pidettiin Kööpenhaminassa tänä vuonna, päätettiin ottaa ranskan ja englannin lisäksi venäjä sallitukseksi kieleksi. Se maksoi 65.000 kruunua (yli 3 miljoonaa markkaa). Mutta miten on saksan, arabian ja kiinan laita?

Astukaa siis ainoa järkevä askel! Heittäkää korvalaput ja silmävarjostimet! Tehkää mahdolliseksi esperanton ottaminen pakolliseksi aineeksi kaikkiiin kansakouluihin, mikäli mahdollista yhtäaikaan kaikissa maissa. Antakaa tämä tehtävä UNESCOLle. Kun se toteutuu, niin yhden sukupolven aikana saamme aikaan kielellisen vallankumouksen, jonka vaikutuksesta tuleva sukupolvi ymmärtää toinen toisensa koko maapallolla.

## NE TROIGU

Mi divenas, ke vi iomete laciĝas pro miaj artikoletoj pri la 16 reguloj de la Esperanto-gramatiko, kiuj reale ne estas 16.

Sed tamen permesu al mi rakonti, ke mi lastatempe trovis tipan ekzemplon pri mencio de la 16 reguloj. En la svedlingva gazeto Esperanto-Nytt mi trovis en n-ro 5 (aprilo 1960) jenan frazon: »Esperanto-grammatiken innehåller endast 16 regler...» (en Esperanto: La Esperanto-gramatiko nur enhavas 16 regulojn...)

Tiu gazeto cetere estas bonega, altkvalita kaj sobra gazeto. Oni disdonas ĝin propagandcele, kaj ne estas dubo, ke ĝi havas grandan signifon por informado al la sveda publiko.

Estas vere bedaŭrinde, ke tiu bonega gazeto nun ricevis tiun makuilon. Kial diri al la ne-esperantista publiko, ke la Esperanto-gramatiko nur enhavas 16 regulojn, kiam ĉiuj komencantoj scias, ke tio ne nur estas troigo, sed eĉ mensogo? Kial ne propagandi sobre?

Mi rekomendas, ke oni diru, ke la Esperantogramatiko havas malmultajn regulojn. Aŭ ke la reguloj estas klaraj kaj facile lerneblaj. Aŭ ke la gramatiko enhavas kiel eble plej malmultajn regulojn. Aŭ ion similan.

Sed neniam diru, ke la Esperanto-gramatiko nur enhavas 16 regulojn.

Svend Dragsted.

(El Dansk Esperanto-Blad)

# LA TRADUKANTA MAŜINO

En Usono estas konstruita granda elektronika kalkulilo, kiun oni jam antaŭ jaroj uzis ankaŭ por tradukoj inter la lingvoj angla kaj rusa. Kelkaj personoj eĉ pretendis, ke la konstruo de tia maŝino jam solvas aŭtomate la tutan lingvan problemon tiel akutan en la mondo. Ni rigardu tre mallonge kiel tia maŝino en principo funkcias, kaj ankaŭ la demandon pri la ebla solvo de lingvo-problemo per tia maŝinego.

La plej grava eco de grandaj elektronikaj kalkuliloj estas la kapablo stoki grandajn, gigantajn, kvantojn da numera aŭ alfabetaj informoj. Tiajn informojn, sciojn, kiuj estas uzataj en la maŝinoj, oni nuntempe nomas ordinare »dato«, la tutan operacion de ilia uzado en la maŝinoj oni sekve nomas »datoprocedado«. Tia dato povas konsisti el nombroj kaj vortoj. Kiam estas demando pri tradukmaŝino, estas nature ankaŭ demando pri alfabetaj dato, do vortoj lingvaj. La tutan daton la maŝino entenas en siaj **memorunuoj**, kiuj estas maŝinpartoj, kiuj estas eble la plej gravaj en la tekniko de elektrona datoprocedado. Ekzistas kelkaj diversaj specoj de tiaj memorunuoj aŭ stokiloj. Plej ampleksaj sed samtempe plej malrapidaj estas la bendomemoroj, kiuj uzas por la enstokigo de diversaj informoj magnetajn bendojn similajn al tiuj, kiujn oni ordinare uzas en normalaj sonbendoaparatoj. (Kiu ne, krom la ofte aŭdata erara termino, estas »magnetofonoj«, ĉar la vorto »Magnetophon« signifas nur sonbendaparaton de konata germana firmao, do magnetofono estas nur propra nomo de unu difinita sonbendaparato). Kalkulilaj memoroj uzas nur iom pli larĝan bendon, ol la ordinaraĵoj. Tiaj bendomemoroj estas tre larĝampleksaj, unu tia povas enteni 23.000.000 signojn,

sekve, se estas demando pri lingvo, kaj la meza vortolongeco estas 10 literoj, unu magnetbenda memorilo povas enteni 2.300.000 vortojn. Se la maŝino estas uzata por tradukado, oni ordinare ne kontentigas per unu magnetbenda bendunuoj, sed uzas ilin ekz. 14, kiel en konata usona maŝino, do, 7 memoriloj po unu lingvo. Estas facila tasko komputi, kiel multajn vortojn oni povas stoki en tiaj maŝinoj

La alia memortipo estas tiel nomata **rapida** stokilo, kiu ne kapablas enteni tiel grandan kvanton da informoj, sed ĝi estas rapidega. Se oni volas serĉi unu vorton el normala benda memoro, oni devas atendi eĉ 4 sekundojn, sed respektiva serĉotempo ĉe rapidmemoro (ankaŭ nomata ferritkora memoro) estas nur unu aŭ du mikrosekundoj, do unu aŭ du **miliono**j da sekundo! Sed, kiel dirite, tia ferritmemoro ne kapablas enteni tiel grandan kvanton da materialo en si, kiel la bendomemoro, kontraŭe, ĝia kapacito estas tre malgranda rilate al la alia tipo, en kelkaj maŝinoj nur 20.000 vortojn oni povas stoki en ferritkora memoro.

Kiam oni tradukas per maŝino, estas la procedo jena: la magnetbendaj memoroj de la maŝino estas dividitaj en du grupojn, unu por ambaŭ lingvoj envolvitaj. La vortoj, kiuj estas enstokitaj en tiuj bendoj, povas esti en kiu ajn sinsekvo, sed ĉiam la respektivaj vortoj devas havi la saman adreson en la memoroj. Do, la numero de bobeno kaj la numero de loko sur la bendo devas esti ĉiam la samaj. Poste, kiam oni donas al la maŝino tekston tradukotan, ekzemple skribante ĝin en ordinara elektra tajpilo, la vortoj tradukotaj tuj iras en la rapidan memoron, kaj samtempe, la unua vorto iras en komparan aparaton, kiu legas mag-



netbendajn memorojn. Ĉiuj 7 bendoj povas esti legataj samtempe, kaj kiam la serĉata vorto troviĝas, ĝia adreso tuj estas sendata al la alia, alilingva, memoraro, el kiu la respektiva traduko en kelkaj sekundoj estas elserĉata, kaj poste tuj skribata en automatika tajpilo. Tiu ĉi operacio postulas meze 3—4 sekundojn povorte. Se la tradukotan tekston oni tajpas ne tro rapide, okazas, ke la traduko aperos en la alia tajpilo samtempe kun la enskribado, se oni estas ŝercema, oni ja povas eĉ tiel aranĝi, ke iu persono povas tajpadi en la skribmaŝino tiel, ke li enfrapas en alia lingvo ol kiu aperas sur la paperon!

Oni tuj komprenas, ke tiamaniere farataj tradukoj ne povas esti tre akurataj, kaj ke kelkaj vortoj ricevas aŭtomate kelkajn tradukojn por laŭplaĉa elekto poste. Tio venas de tio, ke kelkaj vortoj povas havi en iu ajn lingvo multajn signifojn (homonimoj) kaj sama signifo povas respektive havi multajn vortojn (sinonimoj). Neniu pretendas, ke la maŝino faras ĉiun vortaroserĉadon. kaj neniu ankaŭ povas pretendi, ke maŝinaj tradukoj estus, kvankam ne pretaj, sensignifaj. Ili ĉiuokaze ŝparas al la tradukantoj tempon, ĉar la maŝino faras ĉiun vortaroserĉadon. Sed, povas ja okazi, ke la maŝino faras tute erarajn tradukojn, sekve de multaj signifoj de unu vorto. Pri tio oni rakontas du anekdotojn: Iu lingvisto foje vizitis ĉe la loko kie la

tradukanta maŝino estis. Li volis kontroli ties kapablon fari tradukojn el la angla lingvo rusen. Tiu lingvisto — tute korekte — opiniis, ke oni ne povas nomi »cerbo» maŝinon, kiu nur blinde obeas, ne povante fari konkluzivajn konjektojn. Nu, li donis al la maŝino du frazojn: »Can't see anything, understand nothing» kio en esperanto estas: »(Mi) vidas nenion, komprenas nenion», kaj tuj la maŝino eligis respektivan ruslingvan tekston. Ĉar la vizitanto tamen ne komprenis la rusan lingvon, li petis, ke oni enmetu en la maŝinon la ricevitan tradukon kun ordono, ke ĝi estu retradukota anglen. Oni tion faris, kaj la maŝino skribis nur du vortojn: »Invisible, idiot», do »nevidebla, idioto». Ĉu ne estis bela traduko? En alia analogia okazo oni havis unue la biblian frazon: »The spirit is good, but the flesh is weak», la spirito estas bona, sed la karno estas malforta, aŭ kiel ĝi sonas en la esperanta biblia traduko. Nu, ĉiuokaze, post la traduko kaj retraduko, estis la senco iom ŝanĝiĝinta: »The brandy is good, but the steak is weak», kio signifas, ke la brando ja taŭgas, kvankam la bifsteko estas malbona! La kompatinda maŝino konstatis, ke la angla vorto »spirit» ankaŭ havas la signifon de brando, ĝi do tradukis ĝin »vodka», kaj en retraduko ne faris novan eraron! Tiaj amuzaĵoj povas okazi ĉe la gigantaj elektronaj cerboj.

Simo Raumavirta

## TELEVISIO

### Vääksyn Esperanto-Klubon alotteesta Asikkalan vanhainkotiin.

Joulukuun 15 päivänä 1960 järjestetyssä luovutustilaisuudessa luovutettiin televisio Asikkalan vanhainkodin asukkaiden iloksi. Noin vuosi sitten oli Vääksyn Esperanto-Klubon alotteesta avattu Asikkalan Säästöpankissa tili, jota eri yhteisöt ja yksityiset olivat kartuttaneet niin kauniilla tavalla, että edelläkerrotussa

juhlassa TV tuli taloon.

Näin lämpimään tapaan on eräät elämänsä ehtoopuolta viettävät vanhukset saaneet tuntea oikein näkyvällä tavalla kansainvälisen yhteiskielen, Esperanton, olleen rakentamassa keskinäistä ymmärtämystä, arvontoa ja rakkautta eroavaisuuksistamme huolimatta.

# K L U B A V I V O

**Klubo Esperantista de Laihia** okazigis sian jarkunvenon la 15-an de januaro 1961. Unue oni kantis la internacian esperantohimnon »La Espero». Poste oni aŭskultis pri la antaŭeniro de la lingvo en 80 landoj. Esperanto estas nune instruata en preskaŭ 30 universitatoj aŭ altlernejoj, kaj ekz. en Jugoslavio en 100 lernejoj, en Danujo en 10 lernejoj. Ĉirkaŭ 30 misiistoj lernis la lingvon, kaj pluraj religiaj eklezioj aŭ direktoroj aranĝis kursojn kaj diservojn. En Finnlando okazis diservoj en Helsinko pluraj, Isokyrö, Laihia kaj Uusikaupunki. Laŭ nia scio sekvantaj paroĥestroj aŭ prepostoj aranĝis tiujn diservojn: Heino Pätiälä (la plej oftajn), Yrjö Nummi, Paavo Ekko ktp. Se oni volas malkare kaj agrable kaj plej fruktoporte fari vojaĝon, zorgi korespondadon, komercon, viziti kongresojn ktp. tiam estas plej praktike lerni Esperanton, ĉar ĝi estas la plej facile lernebla kaj plej praktike uzebla internacia lingvo. Ekz. en unu jaro ĉirkaŭ 15.000 personoj utiligis la lingvon. En Francujo ĉirkaŭ 9.000 profesoroj aŭ instruistoj proponas ties enigon en studentekzamenon. En Finnlando estas disvenditaj ĉ. 180.000 vortaroj aŭ lernolibroj.

Kiel prezidanton oni elektis H. Salokannel, vice Eero Koivisto kaj sekretarion Hilikka Hölsö, kasiston Lasse Koivisto. Fine, oni trinkis bongustan kafon kaj finis la kunvenon.

Sepeteus

## NI FUNEBRAS

Luis Hernández, eminenta esperantisto, brila esperantlingva verkisto kaj fondinto de la hispana esperantista gazeto »Boletín» mortis 12. 1. 1961. Ni sentas, ke grava laboranto forestas en esperantistaj vicoj, kaj ni varmkore kunsentas kun la familianoj de la forpasinto.

LEK, Helsinki, okazigis sian jarkunvenon 12. 2. -61. Post la aprobo de kont-kaj agadraportoj oni elektis al la estraro jenajn membrojn: Pentti Sivonen — prezidanto, Martti Turpeinen — sekretario, Akseli Kirsilä — kasisto, Tero Björkman, Erkki Järvinen, Reino Järvinen, Aulis Kuvaja. Membrokotizoj por la jaro 1961 estas: individua membro 400:—, dua familiano 300:—, blinduloj kaj gejunuloj 200:—. Klubvesperoj okazos ĉiun duan mardon en laborista domo. — La 25-jara festo okazos la 26-an de marto en A-salono de Laborista domo. En la festo s-ro V. J. Kostiainen faros la festparolon. En la laborplano ni konstatas jenajn notindajn punktojn: Mielfesto en majo, Akcepto de novaj membroj en fino de majo, publika festo en oktobro kaj abifesto en decembro. Plue estos planata vizitekskursoj kamparen. En la fino de la jaro 1960 estis registritaj 83 membroj.

K. J:n



## PACAMA

Pri Beethoven oni rakontas, ke li volis ofte sidadi en kompleta neĝenata paco, en profundaj pensoj. Foje li eniris restoracion, prenis lokon ĉe iu tablo kaj — komencis pensadi senmove. La apudstaranta kelnero volis demandi, kion la fama vizitanto volus havi, sed ne kuraĝis, ĉar videble li meditadis serioze. Fine Beethoven ĉagreniĝis pro la konstanta observado flanke de la kelnero, kaj li alvokis tiun demandante kiom li ŝuldas. Surprizite la kelnero respondis, ke nature neniom, ĉar la majstro ja nenion eĉ mendis. »Nu, bone», diris la komponisto, »alportu kion ajn, sed lasu min fine resti en paco!»

# LETERO EL KANADO

La redakcio recevis el Kanado leteron en kiu oni rakontas pri fondo de nova pacdefenda movado, movado de virinoj. Ni jene publikigas grandparton de tiu ĉi letero, kun espero, ke la afero ankaŭ niajn virinojn interesus.

Sub la nomo VOĈO De VIRINOJ fondiĝis je la 28-a de julio 1960 en Toronto, Kanado virina movado, kiu celas fariĝi tutmonda. Ĝi volas rezisti al la minaco de milito per pozitivaj agoj (i.a. grand-skala internacia korespondado) kaj kontribui senpartie al politika malstreĉiĝo inter la grandpotencoj.

La movado estas gvidata de tre kapablaj kaj speciale en internaciaj rilatoj influriĉaj kanadaj virinoj. Pro tiu fakto ĝi estas unika. Oni aperigis pri tiu tute juna movado en unu semajno jam pli da artikoloj kaj raportoj, ol movadoj kun similaj celoj povis atingi antaŭe dum tuta jaro. Al la estraro apartenas:

**Prezidantino:** S-ino Helen Tucker, Komitatestrino de la Komitato por UNESKO de la Asocio por Unuiĝintaj Nacioj, Delegitino de la Asocio por Unuiĝintaj Nacioj al la Internacia Konferenco de UNESKO pri Plenkreskula Edukado, Gvidantino de UNESKO-misionoj de la Asocio por UN al Meksikio (1957), Japanujo (1958) kaj Jamajko (1960).

**Vicprezidantino:** S-ino Josephine Davis, verkistino por la Kanada Radio kaj por la Nacia Filmkonsilantaro.

**Sekretariino:** S-ino Norma Swanson, prezidantino de kanada eklezia junularorganizo.

**Kasistino:** S-ino Margaret Ashdown, Interliga Komitatestrino kun UN de la Nacia Konsilantaro de la Kanada Federacio de virinaj kluboj por negocantaj kaj profesitaj virinoj.

**Komitatestrino por Internaciaj:** F-ino Muriel Jacobson, ĝenerala Sekretariino de la Mond Universitata Servo, Ĝenevo, Svislando (1950—52), Estrino de Libervola Internacia Unuo de UNESKO en Novjorko (1952—57), Nacia Direktorino de la Tutmonda Jaro por Rifuĝintoj en Kanado.

**Komitatanino por Internacia Korespondado (Angla sekcio):** S-ino Pattie Tanner, Estrino de transoceana korespondado por la Asocio por Unuiĝintaj Nacioj en Kanado.

**Komitatanino por Internacia Korespondado (neangla sekcio):** S-ino Vilma Eichholz, Vicprezidantino de Kanada

Esperanto Asocio, Komisiitino pri la lerneja kampanjo en Kanado.

Dank' al mia persona kontakto kun la prezidantino de VOĈO DE VIRINOJ (VDV) oni rekomendas en la agadplano la studon de Esperanto por plifaciligi la internacian korepondadon. Pro tio mi jam nun ricevis kelkajn enketojn de virinoj, kiuj volas lerni Esperanton.

VDV instigas ĉiujn en la kadro de organizoj, al kiuj ili jam apartenas, intensigi tiujn agadojn, kiuj favorigas internacian interkomprenigon, politikan malstreĉigon kaj abomenon al milito. La plej taŭga kampo por tiuspecaj klopodoj estas laŭ mia opinio nia esperanta movado. Esperantistoj delonge konsciiĝis ke nun — pli ol iam ajn antaŭe paco estas la necesa antaŭkondiĉo ne nur por la progresigo de nia lingvo, sed por la ekzistado de nia tuta civilizacio, eĉ por la daŭrigo de la vivo sur nia planedo. Tial mi certas, ke la VOĈO DE VIRINOJ estos aŭdata kaj resonigata de la esperantistaro.

Ne nur VDV havos avantaĝojn per la uzo de Esperanto, ankaŭ nia movado ege profitus, se ĉiuj esperantistinoj (kaj eĉ konatulinoj aŭ parencinoj de esperantistoj) skribus al tiu nova organizo. VDV vaste publikigus tiun peresperantan eĥon kaj devus insisti, ke ĝiaj membroj tuj eklernu nian lingvon, por ke ili povu respondi al tiu lavango. Virinoj, kiuj konsciiĝas pri la danĝeroj de nia politika situacio tiel devus kompreni, ke ili bezonas nian internacian lingvon por efike labori por la sekurigo de la paco. La patrino instinkto, gardi la vivon de infanoj, povus — se la lavango venus — puŝi la kanadaninojn el ilia ĝisnuna indiferenteco rilate al la lingva problemo, kaj instigi ilin eklerni Esperanton. Dank' al la bonegaj rilatoj, kiujn VDV havas kun amaskomunikiloj, oni je ĝenerala interesiĝo de la publiko sendube publikigus gazetajn kursojn paralele kun radiaj aŭ televidaj kursoj. Ĝis nun kanadaj virinoj estis ĝenerale neinteresitaj pri mondpolitiko, ili sentis sin sekuraj aŭ senpovaj por entrepreni ion. Nun VDV vekis multajn (en la unuaj jam pli ol 700 leteroj alvenis).

Mi ne dubas, ke tiu virina movado rapide ekkreskos ankaŭ en aliaj landoj. Tiucele la edzino de la Nobelpremiito por Paco, s-ino L. B. Pearson promesis en varmkora letero al VDV ŝian subtenon speciale rilate al havigo de internaciaj kontaktoj kun fame konataj virinoj eksterlandaj. Kompreneble tiuj kontaktoj tre verŝajne okazos per la angla lingvo. Sed por demonstri al la estaro re VDV, ke oni



ankaŭ (aŭ eĉ pli efike) per Esperanto povas kontakti tiajn personojn, mi urĝe petas ke la landaj asocio tuj komisiu kiel eble plej taŭgajn personojn por kontakti la plej altrangajn kaj konatajn virinojn en iliaj landoj, por ke tiuj altrangulinoj en siaj naciaj lingvoj kun esperanta traduko (aŭ nur en Esperanto) deklaru sian subtenon al la VDV deklaro. (Pli da ekzempleroj de la deklaro estas haveblaj de la Centra Komitato de VDV).

Se ni povas tiel demonstri al la estraro de VDV la efikon de Esperanto, oni tre verŝajne baldaŭ eldonos ankaŭ esperantlingvan novajleteron.

La Fakto, ke tiu organizo intencas uzi Esperanton por plifaciligi internacian korespondadon, jam nun informis multajn eminentajn kanadajn personojn pri nia lingvo. Se ankaŭ la estonta internacia organizo uzus Esperanton, tio estus de unuranga graveco por nia movado, sed tio nun sole dependas de la eĥo, kiun mia alvoko trovos. Instigu do tuj ĉiun ajn, ke oni direktu la paperkanonon al Kanado. Oni petu korespondantinojn kaj eldonon de esperanta novajletero.

Esperante, ke vi subtenos tiujn klopojn, kiuj tute respondas al la spirito de Esperanto, mi sincere salutas vin

Vilma Eichholz  
Vicprezidantino de KEA

---

## LA OFICIALA KAJ INTERNACIA SPECIMENFOIRO DE BARCELONA (Hispanujo) UZAS ESPERANTON

Same kiel en 1960 ankaŭ en la nuna jaro tiu foiro (unu el la plej gravaj) eldonas sian oficialan afiŝon en Esperanto.

Temas pri belega afiŝo kun moderna plurkolora desegno en la formatoj 70×100 cm. kaj 30×40 cm. Belega por ekspozicio!

Tiun juvelon oni povas ricevi senpage, sed estus utile ke la petatoj menciu kie la afiŝo estos montrata (vendejo, turismoficejo, stacidomo k.t.p.) ĉar la celo ja estas propagandi la foiron ĉie.

Interesitoj turnu sin al:

Feria Oficial e Internacional de Muestras  
Negociado de Propaganda  
Paseo de Maria Cristina  
BARCELONA — 4



### ANONCO

**Observu.** 40-jaran jubileon festos baldaŭ ESPERANTO-SOCIETO »SUKCESO« en Vratza, Bulgario. Skribu amase propagandcele je temo — »Kion mi scias pri Bulgario kaj per kiu fonto«. La adreso sufiĉas.

## MAX REGER ANKORAŬFOJE

Foje Max Reger, la fama komponisto kaj orkestrestro, pri kiu ni jam en antaŭa kunligo rakontis, vizitis en Berlin. La imperiestro Wilhelm ordonis al li aŭdiencon en la palaco. Tie la komponisto matenmanĝis kun sia altranga gastiganto. Poste la imperiestro, kiu en siaj liberaj momentoj ŝatis mem ludadi per kelkaj instrumentoj, volis iom ludi al sia fama gasto. Reger aŭskultis silente kaj respektplene, sed interne li iom timeme nur atendis la neeviteblan momenton, kiam la »Kaiser« demandos, kia la ludado laŭ la opinio de Reger estis. Kaj estis tre timiga afero, ĉar la imperiestro ne ludis tro bone, kaj aliflanke, li ankaŭ ne multe ŝatis nehonestaĵojn. »Nu, kiel sonis?« demandis la imperiestro. Nur sekundeton Reger hezitis, kaj respondis kun granda respekto: »Via moŝto, se vi postulas absolutan honestecon, mi povas nur diri, ke mi neniam pli frue aŭdis kronkapulon ludi tiel bele!«

---

## NIA VETERANO HUGO SALOKANNEL

donas tiujn ĉi du konsilojn:

*Vivigu la societojn*

Oni povus facile fondi novajn societojn en Savonlinna, Mikkeli kaj Jyväskylä. Sed antaŭ ĉio ni devus revivigi la societojn en Turku, Uusikaupunki, Pori, Vaasa, Oulu, Kuopio, Salminen, Lahti, Kymi, Karhula, Kouvola kaj Kotka. Lokaj funkciantoj kaj vere fervoraj samideanoj prenu tiun ĉi esperon sur sian koron.

*40 jarojn da sunbanoj*

Kiel sciante, la suno estas fonto kaj subtenanto de la vivo sur la tuta terĝlobo. Ekz. la subskribinto prenis ĉiusomere sunbanojn kaj se eble naĝis aŭ prenis malvarmajn kompresojn, kaj ĉiam sentis sin tre bonfarta. Tamen oni ne troigu tiun ĉi senkomparan naturkuracadon. Ekz. kormalsanuloj, nervemuloj, pulmotuberkulozuloj, personoj, kiuj havas altan sangopremon kaj strumomalsanuloj ne prenu sunbanojn.

## JUNULAR-GASTEJOJ KAJ ESPERANTO

Dana vagad-entuziasmulo, lernej-inspektoro J. Stig Hansen estas fervora esperantisto. Li sukcesis kunplekti la du ideojn, tiun de internacia lingvo kaj tiun de vagado, fondante la unuan esperantan junulargastejon. Tiu situas en Danlando, en Fredericia, kaj ĝi estas nomata »Pro Pace», aŭ eble nun, kiam ĝi esperantiĝis, »Por Paco». Ne pasis longa tempo post la establo de tiu unua esperantlingva gastejo, kiam jam en Norvegujo fondiĝis la dua, tie funkcias esperanta junulargastejo ĉe Mjølfjell. Estas bonega afero. Kiam »ordinaraj» vagademuloj tranoktas en tia gastejo, ili vole-nevole ricevas etan kvanton da informo pri Esperanto, kaj — se samtempe loĝas esperantistaj noktogastoj tie — ili vidas propraokule kiel Esperanto en la praktiko funkcias. Cetere estas por esperantistaj vagantoj tre agrabla afero viziti gastejon, kie la lingvo estas konata.

Ĉiuj esperantistaj vagantoj, nepre memoru tiujn du lokojn: Por Paco en Fredericia, Danlando, kaj Mjølfjell en Norvegujo. Eble estos oportune viziti unu aŭ alian de tiuj ĉi lokoj dum la kongresa vojaĝo?

### FOTOEKSPozICIO

En la kadro de Arta Festivalo estas organizata dum la 46a Universala Kongreso de Esperanto, en Harrogate, ankaŭ fotoekspozicio, sub la titolo: »La Homaro». Tiu ĉi titolo devas esti rigardata tre nerigore, en tre vasta senco, tial oni povas trovi taŭgajn fotojn eĉ en la malnovaj negativoj, cetere estas ankaŭ tempo por novaj espozoj. Tion ni mencias, nur por ke ĉiu fotoamanto sciu pri la afero. Ĉiu povas partopreni per maksimume kvar nigrablankaj eltiroj kaj kvar kolordibildoj. La Regularon de la Ekspozicio oni aparte publikos, ĝin oni ricevos de la peranto de kongresaj aferoj, sro Vilkki, adreso: SOMERO. Nun ĉiuj kun la kamero ekmovu!

## ANTAŬKONGRESO DE ESPERANTO KAJ SEMINARIO »ORIENTO- OKCIDENTO»

En Londono estas aranĝota antaŭkongreso la 2an ĝis la 4an de Aŭgusto ĉijare. Samtempe okazos ankaŭ seminario »Oriento-Okcidento», kiu, laŭnome, pritraktas demandojn interkonajn de tiuj du diversaj vivsferoj. La antaŭkongresa programo konsistas ĉefe el diversaj distroj, ĉirkaŭekskursoj en Londono, balo, vizito al teatro aŭ baleto kaj aliaj faras ĝin certe ĝuinda okazaĵo. Aliflanke la programo de la seminario estas pli serioza, enhavante prelegojn de komptentaj spertuloj, kaj esperantistaj kaj ne-esperantistaj, el ambaŭ vivsferoj. Dancomuzik- kaj filmprezentadoj kaj vizitoj al londonaj orientaj muzeoj promesas, ke la aranĝo estos instruplena kaj interesa. Sekretario de kaj la Antaŭkongreso kaj la Seminario estas Sro Victor Sadler, 1 Poet's Road, Highbury, LONDON N 5, Britujo. De li la interesitoj povas peti pliajn informojn, kaj ankaŭ aliĝilojn, kiuj jam per si mem estas tre informodonaĵoj.



### ĈU VI ATENDAS LETERPORTISTON?

Ĉu vane? Prizorgu, ke vi repagos vian abonon de  
**ESPERANTA FINNLANDO**

ĉar en aprilo ĝi ne plu senpage venos, kaj vi atendas vane!